

Enhavo

1	Estontaj aranĝoj	2
1.1	<i>La 37-a Esperantologia Konferenco en Bonaero</i>	2
1.2	Konkurso pri partopreno en terminologia kurso	2
1.3	40-a Malferma Tago en Roterdamo, la 10-an de majo 2014 kun <i>Wera kaj Detlev Blanke, Wim Jansen kaj Humphrey Tonkin</i>	3
2	El universitatoj kaj altlernejoj.....	3
2.1	Universitato de Amsterdam	
2.1.1	<i>Wim Jansen</i> – emerita esploristo:	3
2.1.2	Plue aperos la bulteno “ <i>La Amsterdama Katedro</i> ”	4
2.1.3	Ekspozicio pri la Esperanta libro en la universitato	4
2.2	Interlingvistika sesio kun instruista trejnado en UAM.....	4
2.3	Esperanto-kursoj en universitatoj 2013	
3	Informoj de la <i>Akademio de Esperanto: Korespondantoj</i>	6
4	<i>Helmar Frank (1933-2013)</i>	7
5	Pri kelkaj libroj	8
5.1	Biografioj de japanaj esperantistoj (Ulrich Lins)	8
5.2	Grava libro de <i>Klaus Schubert</i> en la reto	8
5.3	<i>Rhodri Lewis: Artefaritaj lingvoj en Anglio – de Bacon ĝis Locke</i>	9
6	Aktuala Bibliografio 3	9
7	La fenomeno WikiTrans.....	11
8	Occidental-Interlingue en la reto.....	12
9	Granda Vortaro Esperanto-Rusa de <i>B. Kondratjev</i> en la reto.....	13
10	Persona bibliografio de <i>Aleksandro S. Melnikov</i>	13
10.1	Biografiaĵoj	13
10.2	La plej gravaj interlingvistikaj kaj esperantologiaj verkoj.....	14
10.3	Aĉeteblaj verkoj de <i>Aleksandro S. Melnikov</i>	22
11	<i>Language Problems & Language Planning 2013</i>	23
11.1	La aktuala redakcio	23
11.2	Enhavo de la kajeroj 1-3/2013.....	24

1 Estontaj aranĝoj

1.1 La 37-a Esperantologia Konferenco en Bonaero

Startinte en 1978, la Esperantologia Konferenco iĝis jam konstanta kaj tre ŝatata programero de la ĉefa tutmonda evento de la Esperanto-socio. Ĝi havos sian 37-an sesion kadre de la 99-a Universala Kongreso de Esperanto en Bonaero, fine de julio 2014.

Organizata de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), la esplora fakulo de UEA, la ĉiujara Esperantologia Konferenco ebligas la prezenton de studoj pri Esperanto kaj rilataj temoj, entreprenitaj laŭ diversaj fakaj kaj esploraj perspektivoj. Ĝia malferma, altnivela kaj interfaka karaktero proponas unikan ŝancon por riĉiga interŝanĝo de scioj kaj vidpunktoj inter fakuloj kaj anoj de la publiko.

La kunordigantoj de la Bonaera Esperantologia Konferenco estas *prof. Esther Schor*, fakulo pri la angla literaturo ĉe la Universitato de Princeton, Usono, kaj *José Antonio Vergara*, estrarano de UEA.

Oni bonvenigas prelegopropojn pri ĉiu ajn aspekto de Esperanto kiel lingvo, kiel socia kaj kultura fenomeno k.s., aŭ pri aliaj esplorkampoj ligitaj al interlingvistiko. Kandidatoj anoncu sin per resumo kaj mallonga biografia informo ĝis la 31-a de majo al *prof. Esther Schor*, <eschor@princeton.edu>.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro

532)

1.2 Konkurso pri partopreno en terminologia kurso

Same kiel en 2012, UEA denove ebligas al studentoj konkursi pri partopreno en terminologia trejnkurso de la internacia terminologia reto TermNet. La unusemajna ne-esperantista kurso okazos de la 14-a ĝis la 18-a de julio en Vieno. Antaŭkonoj pri terminologio ne estas postulataj sed ja interesiĝo pri terminologia administrado, ĉu el la vidpunkto de lingvistoj (ekz. tradukistoj), ĉu el tiu de aliaj fakuloj (ekz. inĝenieroj aŭ komputilistoj okupiĝantaj pri teknologioj por komunikado, dokumentado, klasifikado de scioj ktp.).

Per la konkurso eblos gajni subvencion por povi partopreni en la kurso. Ĝi valoras ĉ. 1000 eŭrojn kaj inkluzivas ĉambregon en junulargastejo dum la kurso, unusemajnan bileton por la publika transporto, plenan studentan kurskotizon (390 eŭroj) kaj vojaĝkostojn ĝis maksimume 500 eŭroj. La subvencion gajnos du studentoj. Aliaj partoprenantoj povos gajni libropremiojn.

En la konkurso povas partopreni studentoj, kiuj estas individuaj membroj de UEA/TEJO kaj, krom Esperanto, regas labornivele la anglan. Por partopreni necesas prepari sian vivresumon (maksimume du paĝoj A4) kaj prefere unupaĝan akompanan leteron, en kiu oni klarigu, kial oni volas lerni pri terminologio. Ambaŭ dokumentojn oni klopodu sendi ĝis la 31-a de marto 2014 al tec@co.uea.org.

Pli da detaloj pri la aranĝo troviĝas en la retejo de la organizantoj:

http://www.termnet.org/english/events/tss_2014/index.php

Detalojn kaj la kondiĉojn de partoprenado oni trovos en la oficiala informilo:

http://esperanto.net/tec/somera-terminologia-trejnado_konkurso2014.pdf

1.3 40-a Malferma Tago en Roterdamo la 10-an de majo 2014 kun Wera kaj Detlev Blanke, Wim Jansen kaj Humphrey Tonkin

La stabo de la Centra Oficejo de UEA invitas vizitantojn al la Malferma Tago, kiu okazos jam por la 40-a fojo sabaton, la 10-an de majo. La unua Malferma Tago de la CO estis en novembro 1994 kaj ekde tiam tiu ĉi ŝatata aranĝo okazas dufoje en ĉiu jaro.

Kun kvar prelegoj la programo estos pli ampleksa ol kutime. Sub la titolo „Interlingvistiko - ĉu nur intelekta ludaĵo?“, *Detlev Blanke* prezentos scienc-strategiajn konsiderojn kaj kelkajn germanajn spertojn tiurilate. En sia prelego „La gramatika domo de Esperanto“ *Wim Jansen* uzos la domon kaj ĝiajn konstru-aspektojn kiel metaforon por prezenti trajtojn de la Esperanta gramatiko el la vidpunkto de la funkcia gramatiko.

Lige kun la 90-a datreveno de la verkistino Marjorie Boulton, tri tagojn pli frue, *Humphrey Tonkin* parolos pri ŝi kaj ŝia verkaro. Fine, sub la titolo „Nefertito kaj Eĥnatono – drameca epizodo el la egipta historio“, *Wera Blanke* prezentos apenaŭ konatajn eventojn antaŭ 3 mil jaroj en la antikva Egiptio.

En la programo estos ankaŭ prezentado de libroservaj novaĵoj kaj de filmoj. Aldone al specialaj ofertoj la vizitantoj povos profiti de ĝenerala sesona rabato en la libroservo, butikumi en la bazaro de esperantaĵoj kaj gajni premiojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 533)

2 El Universitatoj kaj Altlernejoj

2.1 Universitato de Amsterdamo

2.1.1 Wim Jansen – emerita esploristo

La Universitato de Amsterdamo nomumis *Wim Jansen* ‘emerita esploristo’ por la periodo 2014-2019. Por tiu (sensalajra) posteno principe kandidatas ĉiuj pensiuliĝintaj profesoroj, kiuj pretas okupiĝi pri minimume du el jenaj tri labortipoj:
iu esplorprojekto, magistranivela instruado aŭ mentorado, doktora mentorado.

La taskoplenumado devas esti tiel intensa, ke ĝi ĝuas rekonon de la esplorcentro (ĉi-kaze, la lingvistika ACLC) kaj pravigas la disponebligon de oficejo, laŭvice dividenda kun samstatusaj kolegoj, ĉe aparta adreso de la fakultato.

La esploroj de *Jansen* en la kampo de la funkcia gramatiko aplikata al Esperanto, la bibliografia laboro por *Modern Language Association* (MLA) kaj okaza instruado kiel tiu planata en la John Buchanan Masterclass en Liverpolo (marto 2014) pravigas, laŭ la juĝo de la Humanisma Fakultato, la nomumon.

La taskoplenumado estos kompensata per la disponeblo de la supre menciita laborejo kun ĉia normala oficeja subteno, alireblo al ĉiuj elektronikaj servoj de la universitato kaj esplorbuĝeto de mil eŭroj ĉiujare. Fakultata komisiono pritaksos ĉiujare la daŭrigindon de la statuso.

2.1.2 Plue aperos la bulteno „La Amsterdama Katedro“

La nova profesoro pri Interlingvistiko kaj Esperanto, *d-ro Federico Gobbo*, daŭrigas la bonvenan tradicion de sia antaŭulo, *prof. Wim Jansen*, eldoni la bultenon „La Amsterdama Katedro“. Tiu bulteno, kiu aperis trifoje jare, bonege informis pri la universitata agado de la profesoro.

Ĝus aperis la numero 24 (Jansen redaktis 23 numerojn), nun sub redakto de *prof. Gobbo* kun freŝaj informoj pri la transdono de la taskoj.

Interesatoj pri regula ricevo de la bulteno kiel PDF-dosiero kontaktu la katedrestron:
federico.gobb@uea.org

2.1.3 Ekspozicio pri la Esperanta libro en la universitato

Dank' al la iniciato de la emerita profesoro *Wim Jansen*, la nuna katedrulo pri Esperanto kaj Interlingvistiko *prof. Federico Gobbo* organizos **ekspozicion de la Esperanto-Libro en la biblioteko de la Fakultato pri Humanistiko** ĉe la Universitato de Amsterdamo, kune kun la bibliotekistoj kaj kunlabore kun la Centra Oficejo de UEA.

La biblioteko laŭvice gastigas ekspoziciojn de libroj verkitaj en la lingvoj instruataj ĉe la Fakultato, ekzemple la itala. Esperanto profitas tiun ŝancon unuafoje. La libroj estos prezentitaj per slipoj en la nederlanda kaj Esperanto.

La ekspozicio estis malfermita la 13-an de marto 2014 kaj daŭros ĝis la 10-a de majo, kiam okazos la Malferma Tago de la CO en Roterdamo. Ĝi estos vizitebla dum la normalaj malfermhoroj de la biblioteko en la 2-a etaĝo de „Het Bungehuis“ ĉe Spuistraat 210 en Amsterdamo.

Pri la malfermhoroj kaj la situo de la biblioteko vidu <http://www.uva.nl/over-de-uva/de-uva-in-amsterdam/locaties/content/binnenstad/bungehuis.html>.

2.2 Interlingvistika sesio kun instruista trejnado en UAM

Efike kaj agrable pasis la interlingvistika sesio (1-7.02.2014) en la universitato Adam Mickiewicz, Poznano kun partopreno de dudeko da gestudentoj el 10 landoj (entuziasma kvinopo el Brazilo, triopo el Pollando, po 2 el Svislando, Francio kaj Germanio, po unu el Rusio, Hungario, Japanio, Koreio kaj Portugalio).

La populara kaj diskutiga kurso de *prof. H. Tonkin* pri **nuntempa esperanto-movado** estis publika kaj allogis ankaŭ gastojn.

La sesio estis la lasta por la **tri-jara interlingvistika grupo**, kie persista dekopo laboris en tri specialiĝoj:

1) internacia kaj interkultura komunikado kun *Zbigniew Galor*, *Barbara Pietrzak*, *Ilona Koutny*, *Humphrey Tonkin* kaj *Michael Farris*;

2) esperanta literaturo kun *Humphrey Tonkin* kaj *Tomasz Chmielik*;

3) metodiko de esperanto-instruado kun *Katalin Kovats* kaj *Ilona Koutny*.

La lasta estis komuna aranĝo por la *unu-jara instruista trejngrupo*, kiu havis ankaŭ minikursojn pri literaturo kaj gramatiko. Dum la semajno okazis ankaŭ ekzamenoj kaj preparolo de diplomalaboraĵoj, kies prezento estas planita por la septembra sesio.

Dum sia intensa semajna vizito *Humphrey Tonkin* prelegis ankaŭ anglalingve pri lingvaj rajtoj en la Lingvistika Instituto, en kies kadroj funkcias la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj kaj la rektoro de UAM amike akceptis lin.

La merkreda komuna vespero abundis en programoj dank' al la riĉaj spertoj de la partoprenantoj kaj donis eblecon renkontiĝi kun kelkaj poznanaj esperantistoj. Poste, semajnfine okazis sunplenaj kaj bonetosaj ekskursoj al Gniezno (malnova katedralo) kaj al Szamotuly (kastelo kun riĉa kolekto). Fotoj pri la aranĝo videblas en Facebook kaj en la fotoalbumo de Edukado.net.

En septembro estas planata starto de nova interlingvistika grupo. Interesiĝantoj pri interlingvistiko kaj esperantologio, kiuj volas sekvi seriozajn studojn kaj akiri atestilon pri interlingvistiko aliĝu al la eksteraj postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj, unikaj en la mondo! Kontakto ĉe la sube indikita adreso.

Ilona Koutny (interlin@amu.edu.pl) Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj Universitato Adam Mickiewicz <http://www.amu.edu.pl/~interl/>.

2.3 Esperanto-kursoj en universitatoj 2013

Laŭ la dankinda kompilado de *Germain Pirlot* en 2013 okazis Esperanto-Kursoj laŭ jena disdivido:

Nombro laŭlande : Aŭstrio: 1 ; Brazilo: 3 ; Bulgario: 1 ; Ĉeĥio: 1 ; Ĉinio: 13 ; Francio: 1 ; Germanio: 2 ; Hispanio: 1 ; Hungario: 1 ; Italio: 1 ; Japanio : 3 ; Korea Respubliko : 4 ; Kroatio : 1 ; Litovio: 1 ; Meksiko: 2 ; Nederlando: 1 ; Nikaragvo: 1 ; Pollando: 1 ; Usono: 1.
= sume : 40 kursoj en 19 landoj.

Ne ĉiam estis klare, ĉu temas nur pri lingvaj kursoj, kiel ili povas funkcii pri plej diversaj lingvoj, aŭ ĉu temas pri sciencaj prelegoj. Foje ja okazas prelegoj aŭ seminarioj pri la sciencaj aspektoj (do interlingvistiko kaj esperantologio) kaj ligitaj al ili memstaraj kaj diversnivelaĵoj Esperanto-kursoj. Estus bone tion pli klare enketi.

Se mi bone analizis la materialon de Pirlot, sciencaj prelegoj aŭ seminarioj kun interlingvistikaj aŭ/kaj esperantologiaj temoj diversstatusaj okazis en jenaj universitatoj:

Innsbruck/Austrio (magistro Bernhard Tuidler)

Brno/Ĉeĥio (d-ro Josef Vojáček)

Münster/Germanio (d-rino Norma Seithel, D-ro Rudolf-Josef Fischer)

Torino/Italio (prof. d-ro Federico Gobbo)

Zagreb/Kroatio (prof. d-ro Velimir Piškorec)

Šiauliai/Litovio (prof. d-ro Aloyzas Gudavičius)

Amsterdam/Nederlando (prof. d-ro Wim Jansen)

3 Informoj de la Akademio de Esperanto: Korespondantoj

En la statuto de la Akademio de Esperanto en *Artikolo 7. (Korespondantoj)* oni legas:

„Povas fariĝi *Korespondantoj de la Akademio* eminentaj personoj, kies okupoj aŭ funkcioj ne permesas al ili regule partopreni en la laboroj de la Akademio, sed kiuj deziras doni al ĝi la apogon de sia nomo. La Korespondantoj ricevas ĉiujn akademiajn dokumentojn kaj povas eventuale esti konsultitaj pri lingva demando rilata al ilia specialeco. Ili ne havas voĉdonrajton.“ (<http://www.akademio-de-esperanto.org/faktoj/statuto.html>)

Komento de Detlev Blanke:

Kompletege al la supra mencio de kaŭzoj, kial kelkaj personoj ne eniros la Akademion de Esperanto, necesas aldoni, ke alia kaŭzo flanke de iuj personoj estas la neakcepto de kelkaj bazaj principoj kaj agad-kutimoj de la Akademio de Esperanto.

Tio kompreneble ne ekskludas la pretecon respondi al demandoj, se dezirate. Pro tio mi pretis fariĝi „korespondanto de la Akademio“, des pli ĉar laŭ mi lingvo-kultura instanco aparte gravas por planlingvo kiel Esperanto. Pro tio ankaŭ mi akceptis la taskon.

OFICIALAJ INFORMOJ de la Akademio de Esperanto

Numero 24 - 2013 11 23

Informo pri novaj korespondantoj de la Akademio

„Post invito, interkonsento, kaj decido fare de la estraro de la Akademio fariĝis korespondantoj la jenaj personoj, ĉiuj eminentaj en siaj fakoj, por naŭjara periodo, de 2013-12-15 ĝis 2022-12-15.

La Akademio sincere kaj ĝoje bonvenigas siajn novajn korespondantojn.

Wael Al-Mahdi, dentkuracisto kaj trejnisto pri personaj lertecoj de Bahrejno. Li verkas blogon en la angla kaj araba.

Detlev Blanke, specialisto pri interlingvistiko.

Joakim Enwall, profesoro pri la ĉina lingvo ĉe Upsala universitato. Li doktoriĝis pri la lingvo mjaŭ (angle Miao), kiu estas parolata de nacia malplimulto en Ĉinio. Specialisto pri gravaj ne-hindeŭropaj lingvoj.

Sabine Fiedler, profesoro ĉe la Institut für Anglistik, Lepsiko. Specialisto pri frazeologio.

Federico Gobbo, profesiulo pri interlingvistiko kaj esperantologio. Alvenonta profesoro en Amsterdamo.

Wim Jansen, profesiulo pri la eŭska kaj esperanto. Emerita profesoro en Amsterdamo.

Ingrid Maier, profesoro pri la rusa lingvo ĉe Upsala universitato. Specialisto pri la rusa kaj aliaj slavaj lingvoj.

A. Giridhar Rao, fakulo pri la angla. Flue parolas la teluguan, hindian kaj urduan. Senior Lecturer ĉe International Institute of Information Technology, Hajderabado, Barato. Instruisto kaj aktivulo de la barata movado.

Keyhan Sayadpour Zanjani, asista profesoro pri infankardiologio. Prezidanto de la Irana Esperanto-Asocio, tradukanto de *La Florejo* de Saadi al Esperanto, kunlaborinto pri la traduko de *La rakonto de Kjeŭ*. Profesie li estas kardiologo en malsanulejo por infanoj.

Esther Schor, profesoro pri la angla ĉe la Universitato de Princeton, NJ, Usono. Ŝi instruas i.a. judan literaturon kaj tradukitan jidan literaturon. Ŝi organizos la Esperantologian konferencon en Bonaero en 2014 kune kun José Antonio Vergara.

La estraro de la Akademio de Esperanto“

4 Helmar Frank (1933-2013)

Prof. Helmar Gunter Frank, unu el la plej elstaraj pledantoj por la scienca apliko de la Internacia Lingvo dum la lastaj jardekoj, forpasis post longa malsano en la Zamenhof-tago, la 15-a de decembro 2013. Li naskiĝis la 19-an de februaro 1933.

Helmar Frank doktoriĝis en 1958 ĉe la filozofo *Max Bense*, kies maniero kunigi natursciencojn, arton kaj filozofion multe influis ankaŭ lian pensadon. Frank fariĝis konata esploristo kaj aŭtoro pri kibernetiko, precipe pri ĝia apliko al estetiko, pedagogio kaj psikologio. En 1963 li iniciatis la unuan germanan konferencon pri programita instruado kaj instru-aŭtomatoj. Samjare li fariĝis profesoro ĉe la kibernetika katedro de la Pedagogia Altlernejo de okcidenta Berlino. Ekde 1972 li laboris en la Universitato de Paderborn.

Frank lernis Esperanton en 1974 per kurso de *Hermann Behrmann*, kiu poste nomis lian varbiĝon „mia plej granda sukceso“. Frank malkovris la grandan potencialon de Esperanto por la sciencoj kaj la neceson de science pruvitaj argumentoj por la lingvo, kiun li mem preferis nomi ILo. Fine de la 1970-aj jaroj komenciĝis sub lia gvido internacia eksperimento pri la propedeŭtika valoro de Esperanto, kies rezultoj estas ĝis nun ofte uzataj en la informado pri la lingvo.

La kulmina atingo de Frank estis la fondo de la Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino en 1983, kiu celis fariĝi internacia universitato. Helmar Frank estis prezidanto de AIS ĝis decembro 2007. Rimarkinda fariĝis la aperigo de sciencaj verkoj fare de AIS, kutime en dulingvaj eldonoj (Esperanto kaj iu nacia lingvo). Ekde 1995 AIS kaj UEA kunlaboras per la okazigo de AIS-kursoj lige kun la Internacia Kongresa Universitato. Helmar Frank mem kontribuis al multaj sesioj de IKU kiel populara preleganto. Ekde 1974 ĝis 2006 li partoprenis ĉiujn UK-ojn, escepte de tri.

En 1974 Frank kunfondis Eŭropan Klubon, kiu celis antaŭenigi egalrajtecan lingvopolitikon en Eŭropo.

En 1998 Helmar Frank ricevis la unuaklasan Federacian Meritkrucon de Federacia Respubliko Germanio. En 2004 li ricevis la titolon „Esperantisto de la Jaro“ en voĉdonado de „La Ondo de Esperanto“. UEA premiis lin per Diplomo pro Elstara Agado en la jaro 2011.

En 2013, okaze de la 80-a datreveno de Frank, aperis „Littera Scripta Manet, sarta in honorem Helmar Frank“, impona festlibro kun plurlingvaj eseoj de 60 amikoj liaj.

Enkonduke al la inspira artikolo „Kiel konkeri la 'fortikaĵon'“ de Frank en „Esperanto“ (junio 1982; per 'fortikaĵo' Frank celis la sciencojn), redaktoro *Simo Milojević* skribis: „Profesoro Helmar Frank estas unu el la plej interesaj kaj valoraj personecoj, kiuj en la lasta jardeko aliĝis al la Esperanto-movado. Oni delonge ne vidis en niaj vicoj batalanton de tiaj vervo kaj kapacito.“

(Gazetara Komunikado de UEA, n-ro 527)

(En n-ro 84-85 [1-2/2013] IpI publikigis jenajn materialojn pri *prof. Helmar Frank*: prezenton de la festlibro p. 16-17, liston de la publikaĵoj de Helmar Frank en Esperanto, p. 17-22. Krom tio ampleksaj omaĝaj tekstoj aperis en „Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft“ (grkg/Humankybernetik) vol. 55 (2014), kajero 1, p. 3-15.)

La 25-an de aprilo 2014 en la Universitato Paderborn, 14-17 h, okazos memor-aranĝo omaĝe al prof. Frank. Informojn donas *Věra Barandovská-Frank* barandov@mail.uni-paderborn.de)

Red.

5 Pri kelkaj libroj

5.1 Biografioj de japanaj esperantistoj

Shibata Iwao, Gotô Hitoshi, Mine Yoshitaka (editoroj), *Nihon esuperanto jinmei jiten. Biografia Leksikono de la Esperanto-Movado en Japanio*. Tôkyô: Hitsuji shobô, 2013. xiii, 654 p. 15000 enoj. ISBN978-4-89476-664-8

La eldonejo Hitsuji shobô en Tokio, kiu akiris renomon ĉefe per lingvistikaj verkoj, en oktobro 2013 aperigis imponan japanlingvan biografiaron de la japana Esperanto-movado. La volumo kunigas ĉ. 2900 biografiojn precipe de japanoj, sed ankaŭ de kelkaj ne-japanoj, kiuj ekde Zamenhof rolis en aŭ por la japana movado. Al la prezentitaj japanoj apartenas ankaŭ neesperantistoj, kiuj famiĝis en scienco, politiko kaj literaturo kaj almenaŭ simpatiis kun Esperanto. Pri la personoj estas donitaj la ĉefaj biografiaj faktoj. La bibliografiaj indikoj inkluzivas grandan nombron de esperantlingvaj artikoloj kaj libroj, aperintaj dise kaj fore. La historian kuntekston klarigas kronologio (1887 ĝis hodiaŭ).

De la antaŭparolo estas publikigita ankaŭ esperantlingva versio. La kompilan laboron komencis *Shibata Iwao* (1963–2010); post ties morto daŭrigis ĝin *Gotô Hitoshi*, profesoro pri lingvistiko en la Tôhoku-Universitato en Sendai. La redaktan gvidon havis *Mine Yoshitaka*, kiu jam kunrespondeis pri la multe malpli ampleksa praeldono de 1984.

Ulrich Lins

5.2 Grava libro de *Klaus Schubert* nun en la reto

Kiu volas konatiĝi kun la ideoj de la renoma interlingvisto kaj profesia lingvisto, specialisto pri faka tradukado, *prof. d-ro Klaus Schubert* (Universitato Hildesheim), ekde antaŭ nelonge trovos unu el liaj ĉefaj libroj en la reto: <http://d-nb.info/1045615382/34>

Klaus Schubert (2007): *Wissen, Sprache, Medium, Arbeit. Ein integratives Modell der ein- und mehrsprachigen Fachkommunikation*. (Forum für Fachsprachen-Forschung 76.) Tübingen: Narr (Scio, lingvo, medio, laboro. Integriga modelo de unu- kaj plurlingva faka komunikado), 431 p.

La informita interlingvisto konas almenaŭ la sekvajn librojn, redaktitajn de Klaus Schubert:

Schubert, Klaus (1989, Red.): *Interlinguistics. Aspects of the Science of Planned Languages*. Berlin/New York: de Gruyter, 348 p.

Schubert, Klaus (2001, Red.): *Planned languages: From concept to reality*. Brussel: VLEKHO, 257 p.

Klaus Schubert i.a. estis lingvistika direktoro de la nederlanda esplorprojekto pri duon-aŭtomata traduksistemo DLT, kie Esperanto funkcias kiel interna maŝinlingvo.

5.3 Rhodri Lewis: Artefaritaj lingvoj en Anglio – de Bacon ĝis Locke

Antaŭ kelkaj jaroj aperis jena libro:

Lewis, Rhodri (2007): *Language, Mind and Nature. Artificial Languages in England from Bacon to Locke*. Cambridge: University Press (USA), 262 p.

La enhavtabelo:

- 1 Introduction: The idol of market
 - 2 Hartlibian beginnings
 - 3 From Oxford to the Royal Society
 - 4 Discursus: Artificial languages, religion and the occult
 - 5 The *Essay*: Wilkins's 'darling'
 - 6 After the *Essay*: Reception, revision, frustration and failure
 - 7 Conclusion: From pansophia to comprehension
- List of manuscripts cited
Bibliography
Index

6 Aktuala Bibliografio 3

(kp. la unuajn du partojn de la Aktuala Bibliografio en IpI 86 kaj 87.)

Amouroux, Jean (2014): „Carlo Bourlet pli intime“. → *La Gazeto* 29 (2014), 169: 29-30.

Barandovská-Frank, Věra (2013): „Lingvopolitiko kaj interslavismo de Ladislav Podmele“. → *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/Humankybernetik (grkg)* 54 (2013), n-ro 4, 176-189.

Berdichevsky, Norman (2014): „Esperanto and Modern Hebrew – “Artificial” Languages that Came to Life. In: http://www.newenglishreview.org/custpage.cfm/frm/142325/sec_id/142325

Borsboom, Ed (2013): „La origino de la vorto “vosto”. → *La Ondo de Esperanto*, 8-9/2013: 16.

Frank, Helmar (2014): „La Paderborna Eksperimento pri Lingvo-Orientiga Instruado“. → *Internacia Pedagogia Revuo* 44 (2014), n-ro 1:4—9.

Gobbo, Federico (2010): „Fundamentoj de la adpoziciaj gramatikoj“.→Valore, Paolo/ Gobbo, Federico (Hrsg., 2010): *Artificial Languages. Themes in Linguistics and Philosophy*. München: Grin, 83-108.

Gobbo, Federico (2010): „Fondamenti delle grammatiche adposizionali“.→Valore, Paolo/ Gobbo, Federico (Hrsg., 2010): *Artificial Languages. Themes in Linguistics and Philosophy*. München: Grin, 55-81.

¹Gobbo, Federico (2013): „Learning Linguistics by Doing: The Secret Virtues of a Language Constructed in the Classroom“.→*Journal of Universal Language*, 14, Nr. 2:113-135.

Janičič, Dimitrije Diso (2013): *Esperanta-serba vortaro*. Esperantsko-S'rpiski Rečnik. Beograd: Orion/Art, 681 p.

Jansen, Wim (2010): „Esperanto: een taal van mij, een taal om van te houden“.→Valore, Paolo/ Gobbo, Federico (Hrsg., 2010): *Artificial Languages. Themes in Linguistics and Philosophy*. München: Grin, 17-36.

Jansen, Wim (2010): „Esperanto: lingvo malfremda, lingvo aminda“.→Valore, Paolo/ Gobbo, Federico (Hrsg., 2010): *Artificial Languages. Themes in Linguistics and Philosophy*. München: Grin, 37-54.

Künzli, Andreas (2014): „La 9-a Universala Kongreso de Esperanto en Berno antaŭ cent jaroj (1913)“. → *La Gazeto* 29 (2014), 169: 7-16.

Libert, Alan Reed (2010): „Comparing Comparatives in Artificial Languages“.→Valore, Paolo/ Gobbo, Federico (Hrsg., 2010): *Artificial Languages. Themes in Linguistics and Philosophy*. München: Grin, 109-116.

Libert, Alan Reed (2010): „Komparado de komparativoj en artefaritaj lingvoj“.→Valore, Paolo/ Gobbo, Federico (Hrsg., 2010): *Artificial Languages. Themes in Linguistics and Philosophy*. München: Grin, 117-124.

¹Libert, Alan Reed (2012): „The Representation of Korean and Other Altaic Languages in Artificial International Auxiliary Languages“. →*Journal of Universal Language*, 13, Nr. 1:125-167.

¹Libert, Alan Reed (2013): „The Representation of Uralic Languages in Artificial International Auxiliary Languages“.→*Journal of Universal Language*, 14, Nr. 1:117-142.

Löwenstein, Anna (2013): „Sen lernolibro – ĉu vere preferinde?“→*Internacia Pedagogia Revuo* 43, n-ro 4: 11-14.

Meisl, Joseph (2013): *Der "Hillelist" – La Hilelisto. Lazar Markovič Zamenhof (1859-1917) und die Judenfrage – kaj la juda demando*. Aus dem Deutschen übersetzt und kommentiert von – El la germana tradukis kaj komentis Reinhard Haupenthal. Bad Bellingen: Edition Iltis, 24 p.

Minkov, Stefan (2013): „Pri mia esperantisteco.“ →*Literatura foiro* 44 (2013), 264: 173-180.

Perrenoud, William (2013): *Protokolle der Konferenz der International Auxiliary Language Association (IALA) in Genf 20. März bis 2. April 1930*. Herausgegeben, mit einem Vorwort, einem Index, Anmerkungen und Bibliographie von Reinhard Haupenthal. Bad Bellingen: Edition Iltis, 4*+164 p.

Souto Jardim, Luís Guilherme (2014): „Skizo pri la uzo de planlingvoj en aŭtomata tradukado.“ → *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/Humankybernetik (grkg)* 55 (2014), p. 39-47.

Valore, Paolo/ Gobbo, Federico (Red., 2010): *Artificial Languages. Themes in Linguistics and Philosophy*. München: Grin, 135 p.

Valore, Paolo (2010): „La abstrakta esplorado kiel kreado de lingvoj. Kvazaŭ Manifesto“. → Valore, Paolo/ Gobbo, Federico (Hrsg., 2010): *Artificial Languages. Themes in Linguistics and Philosophy*. München: Grin, 9-15.

Valore, Paolo (2010): „La ricerca astratta come creazione di linguaggi. Quasi un manifesto“. → Valore, Paolo/ Gobbo, Federico (Hrsg., 2010): *Artificial Languages. Themes in Linguistics and Philosophy*. München: Grin, 1-7.

Zakrzewski, Adam (2013): *Lingua Internacional. Essai d'un Projet de la Langue Auxiliaire Internationale (1896-1902). Ein unveröffentlichtes Plansprachenprojekt*. Mit einem Vorwort und einer Bibliographie herausgegeben von Reinhard Haupenthal. Bad Bellingen: Edition Iltis, XIV+54 p.

¹⁾ La kontribuojn eblas printi kiel PDF-dosierojn ĉe: <http://unish.org/> (→Journal)

7 La fenomeno WikiTrans

4 281 514 artikoloj aŭtomate tradukitaj en Esperanton el la anglalingva Wikipedia je la dato de la 16-an de februaro 2014 (anglalingva Wikipedia: 4 452 887)

4 280 517 artikoloj, la 15-an de februaro... (anglalingva Wikipedia : 4 452 203)

La tradukkvalito, certe ankoraŭ neperfekta, senteble pliboniĝis de la komenco en 2010.

Proksimiĝas la tempo, kiam WikiTrans havos saman nombron da artikoloj, kiel la anglalingva versio de Wikipedia. Ni imagu ke same geniaj pioniroj kiel *Eckhard Bick* (ĉefa kreinto de GramTrans kaj WikiTrans) kreus saman programon por la nun plej grandaj Vikioj, t.e.

1	angla (en)	4,452,686
2	nederlanda (nl)	1,725,060
3	germana (d)	1,688,337
4	sveda (sv)	1,611,105
5	franca (fr)	1,477,341
6	itala (it)	1,100,189
7	rusa (ru)	1,089,820
8	hispana (es)	1,081,502
9	pola (pl)	1,030,641

Tiam eblus krei la plej imponan Vikipedion el ĉiuj per aldono de diverslingvaj artikoloj el alilingvaj fontoj ne aperantaj en la anglalingva versio! La kvalito de traduko ne ebligas ĝis nun rektan enmeton en Vikipedion sen severa lingva kontrolo, sed se plimultiĝos kunlaborantoj, certe la afero maturiĝos. Oni devas substreki samokaze la gravecon de la laboro farita por Tatoeba <http://tatoeba.org/fre/> en kiu Esperanto havas ankaŭ bonan pozicion, ĉar servoj de aŭtomata tradukado bezonas tian materialon en memoro :

en (angla)	407507
eo(Esperanto)	309668
de (germana)	253982
fr (franca)	223264
es (hispana)	200262

WikiTrans: Maŝintradukado de la tuta angla Vikipedio en Esperanto: <http://epo.wikitrans.net>

Corpuseye: Esperanta tekstaro de Eckard Bick kun 58 milionoj da vortoj:
<http://corp.hum.sdu.dk/cqp.eo.html>

Henri Masson

8 Occidental-Interlingue en la reto

Ankoraŭ ekzistas adpetoj/uzantoj (inter ili ankaŭ esperantistoj) de la planlingvo de *Edgar de Wahl*, kiu aperis en 1922 sub la nomo *Occidental*, post la Dua Mondmilito alinomita *Interlingue*. Oni foje trovas la duoblajn nomojn *Occidental-Interlingue* aŭ *Interlingue-Occidental*. Jare aperas 2 eldonoj de la bulteno „Cosmoglotta“. El numero 316 (72-a jaro:2013), Julí-December, p. 16, ni trovas jenajn retejojn en Interlingue:

Interlingue-Union: Li internet-págine del organisation oficial de Interlingue:
<http://www.interlingue.org>

Li groupe de Interlingue-Occidental che Facebook:
<http://facebook.com/groups/403123056383240>

Li Yahoo Gruppe de Interlingue-Occidental:
<http://de.groups.yahoo.com/group/interlingue-occidental> (19.3.14: 15 membroj)

Li Interlingue-Wikipedie:
<http://ie.wikipedia.org>

Blog de Thomas Schmidt in Interlingue:
<http://interlingue.blogspot.com> (19.3.14: 8 membroj)

Cosmoglotta. Quelc modern numerós del organ del Interlingue-Union:
<http://cosmoglotta.narod.ru>

Archive Cosmoglotta:
<http://www.interlingue.org/cmng/index.html> *

Occidentalitá. Li blog de Sebastian Hartwig con audio-dossieres:
<http://www.occidentalita.blogspot.com> *

Puelleses. Blog de Michelle in Interlingue:
<http://puelleses.wordpress.com>

Jurnal Posta Mundi
http://postamundi.wikikii.com/wiki/Jurnal_Posta_MUNDI *

Yahoo Gruppe Posta Mundi:
https://es.groups.yahoo.com/groups/posta_Mundi (19.3.14: 81 membroj)

(Inter alie ankaŭ en Ido, Interlingua, Esperanto, Interlingue, Novial, Glosa, Mondlango)

*) Tiuj retejoj ne estis malfermeblaj la 19-an de marto 2014.

9 Granda Vortaro Esperanto-Rusa de *B. Kondratjev* en la reto

Apud la klasika vortaro de Bokarev intertempe ekzistas multe pli detala kaj ampleksa, moderna Granda Vortaro Esperanto-Rusa (GVER) de inĝ. *Boris Kondratjev* el Peterburgo kun laŭdire ĉ. 57.000 enskriboj:

<http://www.ipernity.com/blog/bernardo/250414> (Laŭ informo de Bernhard Pabst).

10 Persona bibliografio de *Aleksandro S. Melnikov*

10.1 Biografiaĵoj

Ĝenerale kaj eduke

Melnikov Aleksandro S., nask. 1951.08.08, ruso, *Ĉe-instruisto* (Internacia E-Instituto, Hago), *doktoriĝis* pri la teorio de lingvoscienco per la disertacio „*La principoj de konstruado kaj funkcia evoluo de internacia planlingvo en la moderna lingvistiko*“ (en la rusa, 1990, Belorusia Ŝtata Universitato, Minsko), *habilitaciis* pri kompara lingvistiko per la disertacio „*Lingvokulturologiaj aspektoj de la internaciaj planlingvoj (fone de la etnaj lingvoj)*“ (en la rusa, 2004, Ĉuvaŝa Ŝtata Universitato, Ĉeboksary); ĉi-lastata disertacio montris kial kaj kiel en Eo eblas produkti, konservi kaj transigi kulturaĵojn, kio similigas la E-komunumon al etno, kiujn specifaĵojn havas lingvopersoneco de „tipa esperantisto“ ktp.

Kariere

Melnikov laboris diverstempe kiel instruisto pri fiziko, kemio, biologio, angla lingvo kaj Esperanto ĉe faka mezlernejo kaj superaj lernejoj, dum pluraj jaroj.

Li ankaŭ estis salajrata prezidanto de la Rostova E-klubo.

En 2006-2012 – profesoro kaj estro de la fremdlingva katedro ĉe la Rostova Akademio de Agrikultura Maŝinkonstruado, kiu poste fariĝis parto de la Dona Ŝtata Teknika Universitato, ekde aprilo 2012 samloke scienca esploristo.

Ekde 2013 emerito. Distingita per Honorfolio de la Rusia Ministerio pri Scienco kaj Edukado (2007). Laŭreato de akademiano-Paul Ariste-premio (pro interlingvistikaj meritoj, 2009).

Movade

Esperantistiĝis en 1965. Eksaj estrarano kaj prezidanto de SEJM, TEJO-Komitatano, Ĉef-Delegito de UEA por USSR, estrarano de ASE, vic-prezidanto de SEU, aktuala UEA-Delegito en Rostov-na-Donu. "Rusia esperantisto de la jaro"-2004. Gajninto de la 3-a kaj 1-a premioj en la Belartaj Konkursoj 2006 kaj 2012 (eseo). 2013: Membro de AdE.

Kursgvide, ekzamene kaj lekcio

Ekde 1968 (ankoraŭ lernejo) gvidis E-kursojn kaj seminariojn (ekde 1986 laŭ la propra metodo "Instruado – sen turmentado!") en pluraj urboj de USSR, Aŭstralio, Britio, Germanio, Luksemburgio, Nederlando (projekto "Indiĝenaj Dialogoj"), Norvegio, Usono k. a.; plurajn jarojn lekcio kadre de la Postdiplomaj Interlingvistikaj Kursoj ĉe la Poznana Universitato (Pollando); aktuala membro de la Supera Atesta Komisiono de la Rusia E-Unio;

Prelege

preleginto pri ĝeneralaj, interlingvistikaj, esperantologiaj, E-movadaj kaj E-metodikaj temoj ĉe universitatoj kaj kadre de diversspecaj konferencoj, de naciaj E-kongresoj kaj aliaj E-aranĝoj, en E-klubo de Aŭstralio, Belgio inkluzive Flandron, Britio inkluzive Skotlandon, Ĉeĥio, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio inkluzive Katalunion, Italio, Japanio, Luksemburgio, Nederlando, Francio (1982-2011).

10.2 La plej gravaj interlingvistikaj kaj esperantologiaj verkoj

1. Specifeco de fonaj scioj de la personoj uzantaj Esperanton // Acta Interlinguistica: 12-a Scienca Interlingvistika Simpozio, 27.04 – 01.05, 1984. – Varsovio, 1985, p. 97-160.

2. Международному языку эсперанто – 100 лет (в помощь лектору) {(broŝuro por lekcioj de la tutsovetia kleriga societo „Scio“, Rostova filio) Mejdunarodnomu jazyku esperanto – 100 let (v pomoŝt lektoru) = La internacia lingvo Esperanto – 100jara (helpe al lekcio)}. – Ростов н/Д, 1987, 31 p.

3. К вопросу о логицизме в лингвопроектировании {K voprosu o logicizme v lingvoprojektirovanii = Pri logikismo en lingvoprojektado} // Интерлингвистическая теория и практика международного вспомогательного языка: Учёные записки ТГУ. – Вып. 791. – Тарту, 1988. – Interlinguistica Tartuensis. – Вып. 5, p. 107-125.

4. Некоторые семантические проблемы выбора и обработки лексики для планового международного языка {Nekotoryje semantiĉeskije problemy vybora i obrabotki leksiki dla planovogo mejdunarodnogo jazyka (PMJa) = Kelkaj semantikaj problemoj de elekto kaj prilaboro de leksiko por planlingvo} // Общая интерлингвистика и плановые языки: Учёные записки ТГУ. – Вып. 858. – Тарту, 1989. - Сер. Interlinguistica Tartuensis.– Вып. 6, p.76-90. (La sama artikolo tezforme/draste reduktite aperis en 1988 ĉe la Tartua Universitato kiel tezoj de interlingvistika konferenco 22-24 okt. 1987)

5. Paronimio en Esperanto: premisoj, mekanismo, uzado por vortludoj // Acta Interlinguistica: 13-a Scienca Interlingvistika Simpozio, 27.04. – 01.05. 1985. –Varsovio, 1989, p. 71-101.

6. В клуб «Амикэцо» // Бегство от скуки. Рассказы об интересах и увлечениях. – Ростов-на-Дону, 1989 {V klub “Amikeco” // Begstvo ot skuki. Rasskaz ob interesaj I uvleĉeniĵaj = En la klubon “Amikeco” // Fuĝo de enuo. Rakontoj pri interesoj kaj hobiaj (ero pri la Rostova E-klubo “Amikeco”; eldonkvanto 50 mil ekz.)} p. 82-91
7. Семантические аспекты планового международного языка (полисемия, метафоризация, синонимия) {Semantiĉeskije aspekty planovogo meĵdunarodnogo jazyka (polisemija, metaforizacija, sinonimija) = Semantikaj aspektoj de internacia planlingvo (polisemio, metaforigo, sinonimio)} // Интерлингвистическое конструирование и языковые реформы: Учёные записки ТГУ. – Вып.904. – Тарту, 1990. - Сер. Interlinguistica Tartuensis. – Вып.7, p. 29-41.
8. Об интерференциолектах планового международного языка (ПМЯ) {(tezoj pri ĉeflingve influataj variantoj de la lingvo Esperanto kun enkonduko de la termino „interferenciolekto“, poste ŝanĝita al „interferolekto“) Ob interferenciolektaĵ planovogo meĵdunarodnogo jazyka (PMJa) = Pri interferolektoj de internacia planlingvo} // Интерлингвистические аспекты языковых реформ и проблемы лингвоконструирования: Тез. докл. 2-ой конф. по интерлингвистике, 4-6 окт. – Тарту, 1990, p. 30-32.
9. Принципы построения и функционального развития планового международного языка в современной интерлингвистике: Дис. ... канд. филолог. наук: 10.02.19. – Тарту; Минск, 1990 {(Manuskripto de la doktora disertacio) Principy postrojenja i funkcionalnogo razvitija planovogo meĵdunarodnogo jazyka v sovremennoj interlingvistike = La principoj de konstruado kaj funkcia evoluo de internacia planlingvo en la moderna interlingvistiko}, 196 p.
10. Принципы построения и функционального развития планового международного языка в современной интерлингвистике: Автореф. дис. ... канд. филолог. наук: 10.02.19. – Минск, 1990 {Aŭtora referaĵo de la doktora disertacio “La principoj de konstruado kaj funkcia evoluo de internacia planlingvo en la moderna interlingvistiko”}, 24 p.
11. Specifaj kulturaj scioj de la esperantista kvazaŭetno kaj ilia respeguliĝo en la koncerna lingv(aĵ)o. – Ростов н/Д, 1992, 105 p. (eldonita laŭ oficiala mendo de la Rostova Esperanto-klubo “Amikeco”)
12. Pri tipa esperantisto, Esperanto-lingvano kaj ... handikapoj. Rostov-na-Donu, 1992, 14 p. (eldonita laŭ oficiala mendo de la Rostova Esperanto-klubo “Amikeco”); reldono: Bookleaf Publishing. – Bakers Hill kaj Beverly WA, Australio, 1995, 11 p.
13. Babilaĵoj de esperantisto. Lavango n-ro 1. – Rostov-na-Donu: La aŭtoro, 1995, 48 p
